



ŜAJNAKACIA ROBINIO

Robinia Pseudoacacia

 1976?

Ĉu mi flustru al vi sekreton? Akacia mielo estas farita ne el akaciaj floroj, sed el la mirinde odoraj blankaj aretoj de ĉi tiu *robinio* aŭ falsa *akacio*. Same kiel indianoj devenas ne el Barato, ĉi tiu nomo rezultas de erare kreita nomo. Jean Robin, persona kuracisto de la franca reĝo, en 1601 plantis en Parizo semon, devenintan el Ameriko. Li pensis, ke ĝi estas akaci-semo. La granda botanikisto, Linnaeus pli bone sciis, kaj estis tiom afabla, ke li nomis la arbon *robinio*.

Robinio estas facile rekonebla pro ĝia profunde kanelita trunko, pro la pikiloj sur ĝiaj nudaj branĉoj kaj pro la karakterizaj folioj. La ligno estas forta kaj povas rezisti al insektoj, lignoputradon kaj kontraŭstari malbonan veteron; do homoj ŝatas uzi ĝin por subteni vinberarbojn, por ĝardenaj mebloj kaj en la pasinteco ankaŭ por lignaj radradioj. Ĝi estas tre bona alternativo al tropika malmola ligno. Atentu: la krudaj semoj estas venenaj. Manĝinte ilin ĉevaloj malbonfartas, same kiel homoj kaj kokinoj. Tute male frandas ilin volonte la verdaj kolumpsitakoj. El ĝiaj floroj bakeblas bongustaj kukoj.

www.josvertelt.nl



Ook in andere talen



Also in other languages



Ankaŭ en aliaj lingvoj

